

Rakontaro de Genĝi

Kelkaj Kapoj

21 Dancistinoj (volumo 2)

34 Juna Verdaĵo A (volumo 3)

45 La Nimfo de la Ponto (volumo 4)

54 La Flosponto en la Songô (volumo 5)

Kelkaj Kapoj el Rakontaro de Genĝi

verkita de sinjorino *Murasaki*
tradukita de *belmonto*

eldono de ĉi tiu ekzemplo: 2024-01 v.1
disdono estas libera

21 Dancistinoj

– *Wotome* –

源氏物語 第二十一帖 少女 をとめ

* *Genĝi* estas 33-jara *

1. *Genĝi* salutas al virinoj

Jaro ŝanĝiĝis al la nova, kaj la funebra periodo por la eksa Mikadino²⁸ Visterio estis finita. Oni ŝanĝis sian veston al ordinara, kaj de la luna aprilo oni vestis sin per somera vesto pompe. Kaj pli, kiam okazis la festo de *Kamo*, stato de la ĉielo sentiĝis agrabla. Dume Farbito, la eksa Diserva Princino de *Kamo*, estis en pensado senokupe. Vento tra kacurarboj venis kaj okazigis sopiron al pasintaj tagoj, kaj junaj ĉambelaninoj rememoris ilin. Tiam venis salutletero de la Grandsinjoro *Genĝi* al Farbito, demandante kun la utao:

"Kiel pace vi pasigas la ceremonian tagon de Sinpurigo?

Hodiaŭ

Jam vi spertis defunebron
En Purigo de fest' *Kamo*
Riverakvo pelis ombron
De malĝojo, kara damo"

Li skribis sur purpura papero, kaj faldis ĝin en oficiala formo, kaj kroĉis al branĉeto de visteria floro. En tiusezona emocio, Farbito skribis la respondon:

"Vestis mi per vest' funebra
Ĝis hieraŭ – tiel kredas
Mi hodiaŭ per ag' sankta
Novigite mondon trotras

Sed nur efemere."

Ŝian simplan respondon li rigardis kun atento kiel kutime. Okaze de ŝia vestoŝanĝo al la ordinara, li sendis ŝiajn vestaĵojn al ŝia ĉambelanino *Senĝi* en la ĉambron tro multe ĝis manko de spaco por meti. Farbito vidis ilin embarasite, kaj esprimis sin ankaŭ en vortoj.

Senĝi pensis:

'Sed, se li aldonus iel amoreman leteron allogi ŝin, mi redonus ilin al li iamaniere. Dum jaroj tamen kutimaj estis liaj donacoj kiel sezonaj salutoj, kaj lia letero estas sobra ankaŭ ĉi-foje. Kiel mi povos rifuzi lian bonkoron?'

Tiel ŝi pensis en perplekso.

Genĝi ankaŭ same salutis al la Kvina Princino²⁹, ne preterlasante la bonan ŝancon. Ŝi ĝojis kaj diris:

"Ho, mi vidis ĉi tiun sinjoron infano ĝis hieraŭ kaj hodiaŭ, sed li kreskis plenaĝe kaj salutas! Lia vizaĝo estas pure belaspekta, kaj aldone eĉ la koro estas supera ol aliaj."

Junaj ĉambelaninoj ridis je ŝia troiga laŭdo. Kiam ŝi parolis kun Farbito, ŝi diris:

"Tiel fervora saluto de la Ministro ne komenciĝis de nun. Vi staris sur la speciala dieca posteno, kaj via forpasinta patro³⁰ damaĝe ĝemis neeblecon prizorgi lin per sia propra mano, pro ke vi ne akceptis lin kiel vian edzon, kontraŭ la volo de la patro. [...]"

²⁸Edzino de *Mikado*.

²⁹Onklino de Farbito kaj de *Genĝi*.

³⁰Princo *Momozono-Ŝikibukjaŭ*, la pli juna frato de la Mikado Paŭlovnio.

34 Juna Verdaĵo A

源氏物語 第三十四帖 若菜上 わかなじょう

* *Genĝi estas 39-jara* *

1. *Suzaku deziras fariĝi monaĥo*

La eksmikado *Suzaku* malsaniĝis de post la akompana ekskurso al *Rokudeŭvin* por la lasta aŭtuna festeno. Li estis malfortika origine, kaj fariĝis maltrankvila ĉi-foje.

“Jam de longe mi havis volon servi al Budho fervore. Kiam mia patrino la *niogo*⁵⁶ *Kokiden* ankoraŭ vivas, mi hezitis stari kontraŭ ŝi en ĉio, kaj ne aŭdacis agi laŭ mia plaĉo. Kaj tio pelas min al la vojo; mi ne restos longe en ĉi tiu mondo.”

Li diris tiel, kaj ordonis necesan preparon al tio.

Li havis kvar princinojn, krom la Kronprinco. La princino nomata *Visterio* estis la filino de la pli antaŭa Mikado de la Mikado Paŭlovnio, kiu poste descende fariĝis vasalino. Ŝi fariĝis la edzino de la tiama Kronprinco, kaj devus esti la Mikadino poste. Sed ŝi ne havis bonan kuratoron, kaj la patrino ne estis altdevena kaj eĉ ŝi mem naskiĝis kiel la filino de la duaranga *kaŭjo*⁵⁷, tial do ŝi estis senapoga eĉ en la palacservado. La Grandsinjorino *Kokiden* dume suprenvenigis la Estrinon de *Najŝi*, kaj precipe zorgis ŝin senkompareble ol aliaj. *Visterio* estis flanken puŝita de ŝi, kvankam la Mikado amis ŝin kara. Sed ĉar li jam cedis la tronon, ŝi bedaŭris ĝin senfine, kaj forpasis malbenante la socion. Li amis kaj zorgis la trian princinon pli karese ol ĉiuj aliaj, kiun ŝi naskis. La princino estis dektri aŭ -kvar jara.

“Mi volas loĝi en la monta templo, forĵetante ĉi tiun socion nun, sed al kiu apogante ŝi tenos sian vivon?”

Suzaku ĝeme zorgis nur pri ŝi, kun bedaŭro.

La konstruado de la templo en la Okcidenta Monto estis jam finita, do li urĝis la preparon transloĝi, kaj samtempe urĝis la Ceremonion de la Jupovestado por ŝi. Li donacis al ŝi multe da valoraj konservaĵoj en la Palaco, ne parolante pri la trezoroj kaj mebloj, ĝis la ne gravaj ludiloj, kaj disdonis al aliaj princinoj la restantajn.

2. *Suzaku petas de la Kronprinco*

La Kronprinco aŭdis, ke la patro estas malsana, kaj aldone havas deziron fariĝi monaĥo, do li mem vizitis lin. Akompane venis ankaŭ la

patrino, la *niogo Sokjaŭden*. Ŝi ne estis tiom profunde amita de li, sed ilia ligiĝo estis tre gratulinda, ke naskiĝis ĉi tiu Kronprinco inter ili. Ili interŝanĝis la rakontojn dum multaj jaroj. Li ankaŭ donis al la filo instrukciojn pri ĉio, precipe pri kernajn punktojn regi sub la ĉielo. [...]

[56](#) niogo = unuaranga edzino de la Mikado. 女御.

[57](#) kaŭjo = duaranga edzino de la Mikado. 更衣.

45 La Nimfo de la Ponto

– Fasi Fime –

源氏物語 第四十五帖 橋姫 はしひめ

* *Kavoru* estas 20-jara *

1. la malfeliĉa Oka Princo

En tiu sama tempo estis la maljuna Princo⁷¹ kun nenia potenco en la socio. Lia patrina familio estis tre nobla, kaj oni supozis ke li staros kiel la Kronprinco en iu politika stadio⁷², sed la tempo ŝanĝiĝis al la alia kaj li devis suferi mokon de la socio. Jam ne restis eĉ spuro de esperita gloro. La subtenantoj elreviĝis kaj forlasis sian postenon aŭ monaĥiĝis rezignante la socion. Tiel la Princo perdis apogon kaj subtenon oficiale kaj private, kaj ŝajnis esti lasita soleca.

Ankaŭ lia edzino estis la filino de la antaŭa Ministro. Ŝia nuntempa situacio estis frape soleca, kaj ŝi rememoris la esperon de la gepatroj, ke ŝi estu la edzino de la Kronprinco kaj fine de la Mikado, kio kondukis ŝin en senfinan malĝojon. Ilia sola konsolo estis longjara intima geedzeco, kaj ili vivis en tuta fido reciproke.

2. naskiĝo de filinoj

Jaroj pasis, sed ili ne havis idon. La Princo ĉagreniĝis kaj esprimis sian deziron, pensante: ' Por konsolo de nia soleco en senokupeco mi volas havi ĉarman bebon iel.' Kaj jen naskiĝis la tre ĉarma filino neatendite por lia mirĝojo. Dum la Princo vidis kaj nutris ĝin senfine mirinda, la edzino gravediĝis sinsekve. Li deziris filon ĉi-foje, sed la naskito estis ankaŭ filino. La patrino fartis grave malbone post la akuŝo kaj forpasis. Li perpleksiĝis tre ŝokite.

'Trapasigante jarojn tre multe ĉirkaŭis min malfacilaĵoj neelteneblaj, sed min detenis la ligiĝo kun ŝi, en nefacile forlasebla sopirinda koro kaj figuro, kaj en tiu stato mi vivis ĝis nun. Postlasite sola en la mondo, soleco kovras min troige. Nutri ĉi tiujn junajn filinojn per vira mano havos limon kaj ricevos onian ridon kiel princaĉo.'

Kun tiu penso li volis plenumi sian deziron fariĝi monaĥo, sed hezitis postlasi la bebojn sen nutranto-kuratoroj. Dume jaroj pasis kaj

la infanoj respektive kreskis kun ĉarmaj vizaĝoj kaj figuroj senmakule. Do la Princo pasigis matenon kaj vesperon, konsolite de ili.

La servistinoj murmuris pri la due naskita bebo:

“Kiel sinistre! anstataŭante la patrinan vivon!”

Kaj ili traktis ĝin sen plena zorgo. Ĉe la fina stadio de sia vivo perdante la konscion, la patrino bedaŭris ĝin kun kompato. [...]

[71](#) = la oka filo de la Mikado Paŭlovnio, kaj la pli juna frato de *Genĝi*.

[72](#) Referencu la ĉapitron 4. *Kokiden*, la patrino de la Mikado *Suzaku*, intencis starigi lin kiel la Kronprinco, sed malsukcesis.

54 La Flosponto en la Songô

– *Yume no Uki-Fasi* –

源氏物語 第五十四帖 夢浮橋 ゆめのうきはし

* *Kavoru* estas 28-jara *

1. *Kavoru vizitas Jokava*

Veninte en la montotemplon *Fiej*, *Kavoru* lasis recitadi la sutrojn kaj adorkliniĝis antaŭ la budhostatuo kiel kutime. Sekvantan tagon li venis al *Jokava*. La tiea *soŭduo*⁸⁹ surpriziĝis kaj fervore regalis lin.

Dum jaroj *Kavoru* petis de li budhoservadon kaj konis lin, sed ankoraŭ ne estis intima. Ĉi-foje la pastro servis por la malsano de la unuaranga Princo, kaj lia servado montriĝis tre efika. Vidinte tion, *Kavoru* estimis lin tre alte kaj ilia rilato profundiĝis. Tial la bonzo gajege akceptis lin la gravan altrangulon, veninta kun intenco. La nobelo interŝanĝis multajn rakontojn en libera koro, kaj oni servis al li vaporan sekigitan rizaron en varma akvo.

Baldaŭ servistoj foriris kaj restis du solaj en kvieto.

Kavoru demandis:

“Ĉu via domo lokiĝas ĉirkaŭ *Vono*?”

La *soŭduo* respondis:

“Vi pravas. Tre mizera loĝejo. Mi havas tre maljunan patrinon la monahinon, kiu ne havas modestan domon en la Urbo. Dume mi hardas min en severa trejnado en profunda monto, do mi metis ŝin tie, por konsolviziti ŝin intertempe nokte aŭ krepuske.”

Kavoru diris:

“En tiu vilaĝo homoj loĝis multe ĝis lastaj jaroj, sed nun tre malmule.”

Li proksimiĝis al la pastro, kaj parolis en mallaŭta voĉo.

“Mi timas, ke ĉi tiu parolo ŝajnos senbaza, kaj okazigos al vi suspekton pri la detaloj, se mi pridemandos - tial mi hezitas. Mi aŭdis, ke en tiu montovilaĝo kaŝite loĝas la virino, kiun mi devas prizorgi. Se tio estos vera, mi volis sciigi la cirkonstancon al vi post la konfirmo. Dume ŝi fariĝis via disĉiplino, kaj ricevis la instruojn de la evitindaj aferoj. Ĉu ekzistas tiu fakto? Ŝi estas ankoraŭ juna kaj havas gepatrojn, do iuj akuzas min, ke mi forpelis ŝin morta el la mondo.”

2. *la soŭduo rakontas pri Flosboato*

La *soŭduo* pensis:

'Ho, tiel estis! Verdire ŝi ne aspektis virino ordinara. Ĉar la *Dajŝaŭo Kavoru* traktas ŝin tre grave, ŝi estos la amatino ne en frivola animo.'

Li estis deprimita kaj pentis ŝian alifigurigon sen konsidero, spite al la altranga pastro. Li perpleksiĝis kiel respondi.

'Li ŝajnas certe havi informon de iu informanto. Bone sciante pri la afero, li intence demandas min. Mi ne kaŝu plu pri ŝi. Plua kaŝado portos al mi maloportunon.'

Post tiu meditado li ekparolis: [...]

[89](#) la duaranga pastro de la budhisma hierarkio.